

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

EN LA NUMERO:
Domo-sank-
tejo

La Balka-
noj — zono
de paco

Neutiligitaj
rezervoj

Laborista
E-movado en
Ruse

25 jarojn
medicinista
E-sekcio

La Lejpciga
proceso

Organiza vivo
Juna esperan-
tisto

Lingvaj
problemoj

Distroj

Sporto





Estas iu domo en Sofio, ĉe str. „Opalcenska“ 66, en kiu ĉiu aĵo memorigas pri personeco kara por la progresemaj homoj el la tuta mondo. Ne grave ĉu tiun ĉi aĵon oni vidas en la modesta, ĉiutageca etoso de la ĉambroj, aranĝitaj en la stilo de la iama bulgara vivmaniero, ĉu en la kabineto inter la zorgeme konservitaj libroj. . .

En tiu ĉi domo, en la iama malriĉa laborista kvartalo „Konjovica“, loĝis de 1888 ĝis 1923 la neforgesebla gvidanto kaj instruanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrov. Depost 1951 la domo havas sian historion kiel domo-muzeo. La komencon metas malgranda ekspozicio el hejmobjektoj kaj mebloj, la pliparton de kiuj ĉe malfacilaj kondiĉoj, dum pli ol du jardekoj konservis la fratino de Dimitrov — Magdalina Baranova. Multe pli malfrue, en la alia konstruaĵo aperas la nova dokumenta ekspozicio, komplete respugulanta la vivon kaj la faron de Georgi Dimitrov. En 55 montrofenestroj estas prezentitaj ĉirkaŭ 600 ekspozitaĵoj. Inter ili estas multaj manuskriptoj kaj unuaj eldonoj de verkoj de Dimitrov, originalaj objektoj, ĵurnaloj kaj gazetoj, en kiuj estas publikigitaj liaj artikoloj kaj studoj pri gravaj problemoj de la bulgara kaj internacia komunista kaj laborista movado, multaj fotoj kaj aliaj dokumentoj. Ĉi tie oni povas aŭskulti la voĉon de Georgi Dimitrov en germana lingvo dum la Lejpeca Jugproceso en 1933, kiam li donis la unuan moralan-politikan baton al la faŝismo, aŭ en rusa lingvo, kiam li faris la historian raporton antaŭ la Sepa Kongreso de la Komunista Internacio en 1955. . .

Kompreneble, tio estas nur la ekspozicia parto de la hodiaŭa Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“, altirinta ĝis nun pli ol 1 900 000

DOMO-SANKTEJO

vizitantojn el Bulgario kaj el eksterlando. Jam depost sia fondo la muzeo evoluas kiel unueca esplora kaj kultur-kleriga instituto, kiel grava ĉenero en la ideologia laboro de la Bulgara Komunista Partio. Dum pluraj jaroj tie ĉi oni faras gravan eldonan, scienc-esploran kaj propagandan laboron por pristudo kaj popularigo de la vivo kaj la faro de Georgi Dimitrov. Dum tri jardekoj oni kolektis kaj konservis pli ol 48 000 ekspozitaĵojn, pli ol 450 magnetofonajn surbendiĝojn kun rememoroj pri Dimitrov de liaj samtempuloj. Konsiderindan sciencan kontribuon prezentas la publikaĵoj de muzeaj kunlaborantoj en la jam aperintaj kvar volumoj de la Jarlibro de la Nacia Muzeo kaj en vico da aliaj eldonaĵoj.

Por la celebrado de la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov la muzea kolektivo laboras laŭ speciala programo. Kion antaŭvidas tiu ĉi programo? Aperos la kvina volumo de la muzea Jarlibro, oni preparas novan trivoluman eldonon de la verkoj de Georgi Dimitrov, kunlaborantoj de la muzeo partoprenas la aŭtoran kolektivon de albumo „Georgi Dimitrov — nia nuntempulo“ — eldona laŭ iniciato de la soveta eldonejo „Planeta“ (Planedo) kaj la bulgara eldonejo „Nauka i Izkustvo“ (Scienco kaj Arto). La muzeo organizos ankaŭ la plej grandan sciencan aranĝon, dediĉitan al la jubileo — internacian scienc-praktikan konferencon je temo „La batalo kontraŭ la faŝismo kaj milito, por paco kaj demokratio“, kiu okazos en septembro j. k. kun partopreno de muzeaj fakuloj el la socialismaj landoj.

En la antaŭtago de la jubileaj solenaĵoj en la Popola Palaco de Kulturo en Sofio estos malfermita granda ekspozicio. Sur proksimume 1200 m² estos prezentitaj multaj aŭtentikaj dokumentoj kaj materialoj pri la vivo de Dimitrov, multaj el ili ĝis nun estas nekonataj al la publiko. Por la unua fojo oni povos vidi restarigojn de la kabinetoj de Georgi Dimitrov kiel ĝenerala sekretario de la Komunista Internacio en Moskvo kaj kiel ministro-prezidanto de nova Bulgario. Variantojn de tiu ĉi ekspozicio oni jam invitis gastoj en ok socialismaj landoj. Estas interese, ke la antaŭstarantan en Dimitrovgrad renkontigon de laborulaj kolektivoj, portantaj la nomon de Dimitrov, unuafoje ĉeestos ankaŭ reprezentantoj de tiaj kolektivoj el eksterlando.

Asen BOJAĜIEV



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

APRIL O

4 • 1982

LA BALKANOJ — ZONO DE PACO KAJ INTERKOMPREENIGO

Ekde la socialisma revolucio je la Naŭa de Septembro 1944 Popola Respubliko Bulgario sendevie sekvas la linion de ekstera politiko sur la principoj de la proleta kaj socialisma internaciismo kaj de la paca kunekzistado inter la ŝtatoj kun malsama sociordo. Tiuj ĉi principoj estas ne nur proklamataj, sed ili estas strikte observataj.

Bazo de la ekstera politiko de nia lando estas la bulgara-soveta amikeco, kiu ĉiam pli kaj pli disfloras, senĉese pliriĉiĝas. Bulgario aktive plenumas siajn taskojn kiel membro de la Varsovia Pakto kaj de la Konsilio por Ekonomia Interhelpo kaj donas sian kontribuon por pligrandigo de la ekonomia kaj defenda potenco de la frataj socialismaj landoj.

Bulgario gajnis reputacion de lando, kiu aktive laboras por stabiligo de la paco kaj la kunlaborado inter la ŝtatoj kun malsama sociordo. Ĝi partoprenas grandajn iniciatojn kiel la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo kaj subskribis ties Finan Akton; la Vienajn intertraktadojn pri limigo de la armitaj fortoj en Centra Eŭropo; la UN-Komitaton pri Malarmado, ktp.

Nia lando subtenas intensajn rilatojn kun preskaŭ ĉiuj eŭropaj kapitalismaj landoj, kun Japanio, Meksikio kaj kun vico da latin-amerikaj ŝtatoj.

Sed kiel balkana lando PR Bulgario estas interesita, ke la popoloj, loĝantaj en la antikvaj kaj belaj landoj de nia duoninsulo, kiuj jarcentojn intense interrilatis, ĉerpadis el komunaj kulturaj fontoj, vivu en paco, interkompreniĝo kaj kunlaborado. La paco kaj la kunlaborado sur la Balkanoj estas kondiĉo por la prospero de ĉiuj balkanaj landoj.

Per sia konsekvenca ekstera politiko kaj per sia socialisma sistemo PR Bulgario multe kontribuis, por ke la Balkanoj el pulvotenejo de Eŭropo transformiĝu en regionon de paca kunlaborado kaj bonnajbareco, kvankam tie ĉi estas prezentitaj la fundamentaj sis-

temoj kaj kontraŭdiroj en la mondo kaj la milit-politikaj blokoj de Eŭropo.

Hodiaŭ la afero de la paco gajnas sukcesojn en la Balkanaj landoj. En la raporto de CK de Bulgara Komunista Partio antaŭ la XII kongreso de la partio, okazinta de la 31-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1981, estis konstatite, ke ankaŭ en la nuna komplika internacia politika vivo la situacio sur la Balkanoj restas relative trankvila; ke per komunaj klopodoj estas realigitaj pozitivaj ŝanĝoj, atingita estas grava progreso en la reciprokaj rilatoj inter la balkanaj landoj. Desur la tribuno de la XII kongreso la ĝenerala sekretario de CK de BKP Todor Jivkov deklaris la pretecon de PR Bulgario klopodi por senĉesa plibonigo de la klimato de fido en la regiono, iri la vojon, montritan en Helsinko, por ke la Balkanoj transformiĝu en stabilan regionon de progreso kaj interkompreniĝo.

En sia Parolado pri Bulgario, dediĉita al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, Todor Jivkov deklaris la subtenon fare de nia lando al la ideo pri transformo de la Balkanoj en zonon liberan je nukleaj armiloj, kio estus grava kontribuo por la sanigo de la internacia klimato, por la iompostoma transformo de Eŭropo en kontinenton sen nuklea armilaro, estus plia venko de la paco.

Rilate la kontestebajn problemojn, kiaj bedaŭrinde ekzistas inter iuj balkanaj landoj, la starpunkto de PR Bulgario estas, ke ili devas esti traktataj trankvile kaj pacience ĉe la tablo de la intertraktadoj kun manifestado de reciprokaj respekto kaj estimo, kun bonintenca preteco por interkonsento. Nia lando, kiel ankaŭ ĝiaj najbaroj, subskribis la Finan Akton de Helsinko kaj akceptis la realaĵojn post la Dua Mondmilito.

DIMITAR HAĜIEV,
prezidanto de Bulgara
MEM-Komitato

NEUTILIGITAJ REZERVOJ

Kiel veraj patriotoj la bulgaraj esperantistoj fordonas siajn fortojn, konojn kaj sperton por plenumo de la grandaj taskoj, ligitaj kun la konstruado de evoluanta socialisma socio en nia lando, kun la batalo por paco kaj internacia komprenigo. Per la Internacia Lingvo la bulgaraj esperantistoj kontaktas kun siaj samideanoj el proksimaj kaj foraj landoj, konigas al ili la sukcesojn de nia socialisma patrolando. Por sia althumana agado ili ricevas moralan kontentecon kaj la rekonon de la bulgara socio.

Sed ĉu ni, la sofiaj esperantistoj, faris ĉion en la sfero de organiza laboro, de propagando kaj ellernado de la lingvo, por plivastigo kaj variigo de nia E-korespondado, de nia kultura laboro. Sendube ne. Ekzistas ankoraŭ multaj rezervoj, kiujn ni ne sufiĉe utiligas.

Al tiu ĉi grava por la evoluo de la E-movado en la ĉefurbo problemoj estis dediĉita la Raport-Elekta Konferenco de la Urba E-Organizaĵo.

Bazon por vigla diskutado donis la kompleta kaj analiza raporto de la Sofia Urba Estraro de BEA por 1980/1981, farita de ĝia prezidanto Hristo Kanev. En ĝi kritike estis pritaksita la varia organiza kaj kultura agado, kiu estis rekompencita per alta registara rekono — jubilea medalo lige kun la 1300-jariĝo de Bulgario.

En la raporto estis prezentitaj la sukcesoj kaj la mankoj en la organiza, kleriga kaj instrua agado de la E-societoj laŭ profesioj, de la eksa ĉefurba societo „M. Gorki“ k. a. Paralele kun tio en la raporto oni turnis apartan atenton al la farita reorganizaĵo — la kreo de specialigitaj centroj por kultur-kleriga kaj instrua agado, kio estas solida garantio por estontaj sukcesoj.

Oni turnis atenton ankaŭ al iuj malperfektaĵoj en la laboro kun la junularo kaj la infanoj, en la organizado de kursoj por lernado kaj perfektigo de la lingvo, al la nesufiĉa popularigo de Esperanto. Gis nun oni

malmulton faris por ligi la E-agadon kun la laboro de la Patrolanda Fronto, la Komsomolo, la Profesiaj Unuiĝoj ktp.

En siaj eldiroj la delegitoj faris valorajn proponojn lige kun la projekto de kompleksa programo por la estonta laboro.

En sia eldiro la reprezentanto de la Urba Estraro de BKP Georgi Petrov alte pritaksis la agadon de la esperantistoj el Sofio kaj substrekiis iujn neutiligitajn eblecojn por plua variigo kaj pliriĝo de tiu ĉi agado. La reprezentanto de la Urba Komitato de la Komsomolo Dimitar Cernjaev parolis pri la preteco de la sofia junulara organizaĵo garantii materialan kaj moralan helpon al la junaj esperantistoj. La sekretariino de la Urba Komitato por Defendo de la Paco Lidia Hristova same parolis pri ebla utila kunlaborado inter la du organizaĵoj.

Interesaj kaj kritikaj estis la eldiroj de la esperantistoj-veteranoj Nikola Aleksiev kaj Vasil Bozarov — herooj de la socialisma laboro, de Miĥail Ĉobanov, Cano Ignev, Dončo Hitrov, Nikola Mladenov, Boris Atanasov, Kunčo Valev, Dimitar Mutuŝev, Verka Ŝtajner, Dimitar Haĝiev k. a.

La konferenco elektis novan estraron de la Sofia Urba E-organizaĵo, konsistantan el 61 personoj kaj Kontrolan Komisionon el 3 personoj.

Post la fermo de la konferenco okazis kunvido de la nova estraro. Kiel prezidanto de la Urba Estraro de BEA en la ĉefurbo estis elektita la ĝisnuna prezidanto Hristo Kanev, kaj kiel prezidanto de la Kontrola Komisiono — Marin Petrov.

La Sofia Raport-Elekta Konferenco de BEA, kiu pasis je alta organiza kaj krea nivelo, malkovris rezervojn por novaj sukcesoj en la estonta laboro de la ĉefurbaj esperantistoj. Sendube, tiuj ĉi rezervoj estos en la centro de atento tiel de la urba estraro, kiel ankaŭ de ĉiuj membroj de BEA en Sofio, kiuj laboros por ilia utiligo.

HAIM LEVI

DEKLARO PRI KUNLABORADO INTER MEM KAJ SAT

Konsiderante la nunan mondsituacion kun grava minaco al la Paco, la estraroj de Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Mondpaca Esperantista Movado alprenas kiel taskojn:

- plivastigi kontaktojn inter la membraroj;
- aranĝi komunan packampanjon;
- prizorgi gazet-interŝanĝojn kaj inform-

artikolojn koncernantajn la pacmovadon;

- instigi siajn anojn reciproke partopreni en la pacarangoj ĉe kongresoj aŭ konferencoj;
- sekve konkrete servi al la celoj difinitaj en la statuto de ambaŭ asocioj.

Tiun deklaron aprobis kaj subskribis Pierre Levy — prezidanto de SAT, kaj d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM.

LA LABORISTA E-MOVADO EN RUSE EN LA PASINTECO

Rememoroj de Sava Ivanov — E-veterano
kaj kontraŭfaŝista batalanto

Nur du jarojn post la kreo de la Internacia Lingvo Esperanto ĝi jam havas adeptojn en urbo Ruse. El la artikolo de Ivan Krestanov en revuo „Bulgara Esperantisto“ de majo 1942 oni ekscias, ke unu el la unuaj esperantistoj en Ruse estas Stefan Uzunov. Kune kun d-ro Rahovski, en 1900 li kreas esperantan grupon, kies membroj rapide plimultiĝas kaj la 20-an de septembro 1900 estas fondita la unua E-societo „Espero“ en Ruse.

En 1907 en Veliko Tirnovo okazis la unua bulgara E-kongreso, ĉe kiu reprezentanto de la esperantistoj el Ruse estis Todor Gajdarov. Kaj inter la unuaj bulgaroj, kiuj persone korespondis kun la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof, estas ankaŭ Conjo Mirčev el Ruse.

La 26-an de aŭgusto 1907 E-societo „Espero“ en Ruse malfermas senpagan kurson por lernado de la Internacia Lingvo. Lektoro de la kurso estas la tiama prezidanto de la societo Todor Gajdarov.

En 1929—1930 en Ruse estas fondita laborista E-societo „Laborista Stelo“ kun prezidanto Sava Ivanov. Ĝi komencas sian laboron, organizante senpagan kurson por lernado de Esperanto. En la kurso enskribiĝas 18—20 gejunuloj, precipe membroj de la Laborista Junulara Organizaĵo. La kurson gvidis la prezidanto de la societo Sava Ivanov. Oni laboris ĉe malfacilaj kondiĉoj — la polico observis la laboron de la kurso, supozante, ke sub la formo de lernado de Esperanto oni pridiskutas politikajn problemojn. Malgraŭ la malfacilaĵoj, en aprilo 1930 iuj el la partoprenantoj sukcese finis la kurson de Esperanto. Ĝin partoprenis ankaŭ du junaj preslaboristoj — unu el ili estis Nikola Sapunĝiev. Ili presigis atestilojn kaj post la ekzameno al la sukcese finintaj la kurson oni enmanigis atestilojn kaj kiel donacon — grandan afiŝfoton de la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof.

Pli konvenaj kondiĉoj por esperanta agado

en Ruse kreiĝis en 1932. Sed la ŝtatrenverso je la 19-a de majo 1934 metis finon al tiu ĉi agado. En la lando estis starigita ankoraŭ pli kruela teroro kaj estis malpermesitaj ĉiuj politikaj kaj kulturaj organizaĵoj. Kunvenojn kaj konferencojn oni povis organizi nur post permeso de la speciala ŝtata servo.

Feliĉe la estro de tiu ĉi servo en Ruse estis esperantisto — kapitano Stefan Radev, membro de la loka E-societo „Espero“. La konateco kun li permesis al Sava Ivanov kaj al Ivan Kotov insisti pri permeso por okazigo de E-kursoj. Ni ricevis similan permeson en skriba formo kaj en la kondiĉoj de plej granda teroro kaj reprezalioj organizis nian kurson. En ĝi partoprenis 50—60 gejunuloj, precipe membroj de la Laborista Junulara Organizaĵo, kaj kiel lektoroj estis difinitaj Ivan Kotov, Vladimir Georgiev kaj Sava Ivanov. Kvantam la Laborista Esperantista Asocio estis likvidita, la societo en Ruse plu vivis per siaj agoj, ĝiaj membroj fiere portis la insignon de esperantistoj — verda steleto sur ruĝa fono.

La progresemaĵoj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj donis sian modestan kontribuon al la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. Ankaŭ dum la milito ili agis por proksimiĝo kaj interkonatiĝo de la homoj el ĉiuj mondpartoj.

Post la venko je la Naŭa de Septembro 1944 kreiĝis vere bonaj kondiĉoj por libera evoluo de la E-movado en Bulgario. La esperantistoj firme okupis sian lokon en la vicoj de la Patrolanda Fronto. Dank'al ties kontribuo en la batalo kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo en la pasinteco kaj dank'al ties politika aktiveco hodiaŭ, la Bulgara Esperantista Asocio estas unu el la estimataj kultur-klerigaj organizaĵoj en nia socialisma lando.

La rememorojn enskribis
ELENA KAZANĜIEVA

25-JARA JUBILEO DE LA MEDICINISTA E-SEKCIO

La ideo pri organizo de sekcio de medicinistoj-esperantistoj ne estas nova. Jam en 1940 d-ro Boris Nedkov sur la paĝoj de ĵurnalo „Zarja“ starigis la demandon pri fondo de medicinista E-societo. Tio realigis nur en aprilo 1957 dank'al la helpo kaj kunlaboro de la tiama estraro de Bulgara Esperantista Asocio. Baldaŭ la sekcio de medicinistoj ĉe Bulgara Esperantista Asocio plimultigis sian membraron — al ĝiaj vicoj aliĝis pli ol 250 medicinistoj-esperantistoj el la tuta lando.

La Medicinista E-Sekcio estis akceptita kiel kolektiva membro de la Universala Medicinista Esperanto-Asocio (UMEA) kaj estas unu el ĝiaj tre aktivaj reprezentantoj. Ĝi ricevas informojn kaj raportas regule pri sia aktivado. Dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto en apartaj kunsidoj UMEA ĉiam donis pozitivan pritakson de la agado de la Medicinista E-Sekcio ĉe BEA. Tiujn ĉi kunsidojn kaj la pridiskutojn partoprenas ankaŭ bulgaraj medicinistoj-esperantistoj.

La bulgaraj medicinistoj-esperantistoj realigas multflankajn kontaktojn kun siaj gekolegoj el aliaj landoj kaj aktive propagandas la sukcesojn de la sanprotektado en socialisma Bulgario.

Multaj alilandaj esperantistoj turnis sin al la Medicinista E-Sekcio por helpo kaj konsilo lige kun ĝenerala kuracado kaj balneokuracado, interesiĝas pri la eblecoj de nia fizioterapio kaj bankuracado, pri la klimataj kondiĉoj en nia lando, pri iuj medikamentoj ktp.

Niaj medicinistoj-esperantistoj partoprenas per sciencaj raportoj en internaciaj kongresoj kaj konferencoj; apartaj sciencaj medicinaj raportoj estas presitaj en medicinaj E-revuoj.

Medicinistoj-esperantistoj partoprenis ankaŭ internaciajn brigadojn. Ekzemple, d-ro T. Todorov dum la milito en Vjetnamio instruis kaj laboris pere de Esperanto.

Oni devas menciigi ankaŭ la organizon kaj okazigon de la III Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK) en Ruse (Bulgario), 1981, kiu pasis je alta nivelo. Ĝin partoprenis 220 medicinistoj-esperantistoj el 10 landoj kaj estis prezentitaj kaj pridiskutitaj 43 sciencaj raportoj en Esperanto sen la helpo de tradukistoj.

La konferenco akceptis proponojn pri eldono ankaŭ en Esperanto de la materialoj de la Universala Organizaĵo por Sanprotektado pri enkonduko de Esperanto en la medicinaj fakultatoj kaj institutoj, pri eldono en Esperanto de libroj, monografioj kaj resumoj en sciencaj medicinaj revuoj.

Celebrante sian 25-jaran jubileon, la Medicina E-Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio faros ĉion eblan por plivastigi la aplikon de la Internacia Lingvo Esperanto en la medicino kaj por inde prezenti al la mondo la sukcesojn de nia sanprotektado.

Feliĉan feston kaj prosperon en viaj noblaj profesio kaj E-agado, medicinistoj-esperantistoj.

Prof. d-ro K. POPOV
D-ro ST. MORARESKU

NACIA KONFERENCO DE MEDICINISTOJ — ESPERANTISTOJ

En Cicilienhof (Potsdam) de 26-a ĝis 29-a de februaro okazis III Nacia Konferenco de Medicinistoj-Esperantistoj en GDR. En la kadro de la konferenco oni okazigis kunvenon de UMEA. Fakgrupestroj el 4 landoj — GDR, Hungario, CSSR kaj Bulgario, sub la gvido de la sekretario de UMEA d-ro Imre Ferenczy diskutis gravajn problemojn de la asocio. Estas decidite, ke IMEK okazos en julio 1983 en la slovaka urbo Poprad. La baza temo estos „La problemoj de la sano kaj la laborhigieno de sanlaboristoj en la sanejoj“. La aliĝo efektiviĝos pere de la naciaj E-organizaĵoj. En la plenkunsido oni faris pli ol 25 sciencajn medicinajn raportojn kaj sciigojn, la plejparto akompanita per koloraj lumbildoj. Ĉiu raporto estis vigle diskutita.

Aparta kunsido okazis pri medicina terminologio en Esperanto. La ĉefan enkondukan eldiron pri tiu grava problemoj faris d-rino W. Dehler. Sekvis aliaj 8 prelegoj, konsideroj kaj opinioj lige kun tiu ĉi problemoj. Dum la konferenco estis demonstritaj mirinde belegaj vidaĵoj-lumbildoj de la pasintjara Universala E-kongreso en Brazilo kaj serio da poŝtmarkoj kun esperanta kaj medicina temaro. Ĉiujn arangojn partoprenis ankaŭ d-ro Detlev Blanke — gvidanto de la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR. Specialajn laŭdvortojn meritas la alta nivelo de la konferenco, la bona organizado kaj aparate la penoj de la prezidanto de la medicinista fakgrupo d-ro G. Brosche.

Prof. d-ro K. POPOV

LA LEJPCIGA PROCESO — VENKO DE LA PROGRESEMAJ KAJ PACAMAJ FORTOJ



La fama fotomontaĵo de John Heartfield — la „duelo“ Göring—Dimitrov

La bruligo de la germana Reichstag en 1933 estis monstra provo de la germana faŝismo. Ĝi volis havi pretekston por neniigi la organizitan opozicion kontraŭ Hitler, frakasi fizike kaj morale-politike la Germanan Komunistan Partion, ruinigi ĉiujn socialistajn kaj demokratiajn organizaĵojn, aresti kaj likvidi elstarajn personojn el la rondoj de la maldekstre orientita intelektularo.

Tiamaniere oni intencis glatigi la vojon al preparo de milito kontraŭ la unua kaj tiutempe unusola socialisma ŝtato — Sovetunio. La faŝistoj strebis garantii mondan hegemonion al la plej rabemaj germanaj monopoloj kaj la homaron repuŝi malantaŭen al reakcio pli terura ol la mezepoka. Multajn popolojn oni planis likvidi aŭ transformi en amason da kompatindaj sklavoj.

Vespere la 27-an de februaro 1933 la parlamentejo estis en flamoj.

Jam en la unuaj momentoj de la incendio oni diskonigis kun nerona cinikeco anticipe elfabrikitan akuzon: la bruligo estas organizita de la germanaj komunistoj kiel signalo por eksplodigo de sociala revolucio en tuta Germanio.

Komenciĝis sanga Bakĥanalio. Ĉiuj honestaj kaj demokratiaj personoj estis submetitaj al terura persekutado. Nature, plej senbrida estis la teroro kontraŭ la komunistoj, ĉar ili estis la plej firmaj kaj konsekvencaj batalantoj kontraŭ la diktaturo de Hitler kaj la germanaj monopoloj.

Oni oficiale informis, ke la gvidanto de Germana Komunisto Partio Ernst Thälmann kaj la prezidanto de la parlamenta grupo de GKP Ernst Torgler estos juĝataj kiel intelektaj instigantoj de la incendio kune kun la surloke arestita nederlandano Marius Van der Lube, deklarita „komunisto“.

Dekkelkajn tagojn poste estis arestitaj la bulgaroj Georgi Dimitrov, Vasil Tanev kaj Blagoj Popov, membroj de la Centra Komitato de la eksterleĝa Bulgara Komunisto Partio; Georgi Dimitrov ankaŭ estis membro de la Plenumkomitato de la Komunisto Internacio kaj gvidanto de ties Okcidenteŭropa Oficejo.

Por ŝajnigi „internacian komunistan konspiron“ la hitleristoj tuj decidis altiri al la proceso la bulgarajn komunistojn. Tamen la incendio de la parlamentejo turniĝis kontraŭ siajn aŭtorojn: ĝi estis signalo por unuiĝo de la monda progresema publika opinio kaj por komenciĝo de organizita lukto, celanta savi la viktimojn de la bruna pesto.

La patrolando de Dimitrov ne povis resti indifera al la amasa movado defende al la germanaj kaj bulgaraj komunistoj, false akuzataj pri krimaj agoj absolute neakordigeblaj kun iliaj politikaj konceptoj kaj revolucia taktiko. En Sofio formiĝis Tutlanda Komitato defende al la juĝotoj en Lejpcigo, konsistanta el elstaraj aktivuloj de la progresemaj rondoj. La komitato decidis komisi al Nikola Aleksiev, tiutempe sekretario de Centra Komitato de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) kaj redaktoro de ties periodaĵo „Laborista-Kampana Korespondanto“ (semajna ilustrita bulgarlingva gazeto, tribuno de la laboristaj E-korespondantoj) fondi kaj redakti specialan gazeton kiel ties organon.


La vizitantoj de la bonege aranĝitaj salonoj de muzeo „Georgi Dimitrov“ en Lejpcigo povas rimarki i. a. grandan fotokopion de la fronta paĝo de tiu gazeto — „Kontraŭfaŝisma Fronto“, n-ro 1-a de la 15-a de junio 1933. Ĝi aperis ĝuste en la antaŭvespero de Internacia Protestsemajno kontraŭ la Lejpciga Proceso (17—25. 6. 1933), organizita laŭ decido de la Internacia Kontraŭfaŝista Kongreso en Parizo.

La gazeto defendis la bazan postulon de la momento: „Ni savu la juĝotajn Dimitrov, Tanev, Popov, Thälmann kaj Torgler! Ni eltrenu ilin el la ungoj de la sangavida faŝismo! Ni malfermu la pordegojn de la arestejoj kaj koncentrejoj! Aligu ĉiuj aktive al la unueca batalpreta kontraŭfaŝisma fronto!“

La bulgara polico baldaŭ arestis la redaktoron kaj la presiston de la gazeto kaj ĵetis ilin en la Sofian Centran Malliberejon.

Intertempe komenciĝis la Lejpciga Proceso.

La progresemaj homoj el la tuta mondo kaj en Bulgario sekvis kun streĉa atento la evoluon de la batalo por liberigo de la akuzatoj kaj la proceson mem. Kun granda ĝojo oni legis pri la kuraĝa sinteno de Dimitrov antaŭ la Imperia Tribunalulo, precipe pri liaj streĉaj dueloj kun Göring kaj Goebbels. Eĉ bulgaraj burĝaj gazetoj, kvankam iom hezite, devis rekonii, ke nia eminenta samlandano aŭdace defendis la bulgaran nacion kontraŭ la kalumnioj de la faŝistaj gazetoj en Germanio.



„Por ni, la politikaj malliberuloj en Bulgario — skribas N. Aleksiev en siaj rememoroj — kiuj devis aperi antaŭ la faŝista tribunalo, ĉio havis grandan politikan signifon, kion ni observis sur tiu siaspeca monda scenejo, en kiun laŭ la volo de Dimitrov transformiĝis la Imperia Tribunalulo en Lejpcigo. Ni lernis el la ekzemplo de Georgi Dimitrov kiel kondukti antaŭ la faŝistaj juĝistoj, kiel defendi niajn politikajn konceptojn kaj revolucionan honoron. Longa estas la listo de tiuj herooj, kiuj pruvis, ke ili estas indaj

adeptoj de sia samlandano kaj partia gvidanto. Gloron al la memoro de tiuj abnegaciaj dimitrovanoj!“

La vasteco de la konceptoj, defendataj de Dimitrov dum la tribunalkunsidoj, lia transformigo de akuzato en brilan akuzanton, faris fortegan impreson al ĉiu honesta persono, eĉ ne dividanta la ideojn de Georgi Dimitrov. En sia famekonata ferma parolado li traktis tre gravajn principajn demandojn: la eraroj de Bulgara Komunista Partio dum la faŝista puĉo en 1923, ne prisilentante ankaŭ siajn proprajn erarojn; la nacia fiereco de la komunistoj kaj la neceso ĝuste pritaksi la pozitivajn farojn en la popola historio; estimo al la progresema scienco kaj klinigo antaŭ ties herooj kaj martiroj; grandega amo kaj respekto al Sovetunio — efektiva kriterio de la proleta internaciismo. Krome, li demonstris perfektajn konojn pri la historio, juroscienco kaj kulturo de la germana popolo.

Al la progresemaj voĉoj el multaj landoj aligis gazeto „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“, kies materialoj pere de Esperanto kolektigis el diversaj partoj de la mondo. Diference de la bulgara burĝa gazetaro, „ILKK“ sciigis al siaj legantoj la veron pri la Lejpciga Proceso kaj pri la veraj provokintoj de la incendio de la parlamentejo. Sur siaj paĝoj la gazeto (unufoje en n-ro 9/1933) publikigis faktojn pri la incendio kaj protestojn de organizitaj esperantistoj el Asenovgrad, Pazarĝik, Plovdiv, Sofio kaj el aliaj loĝlokoj kontraŭ la proceso en Lejpcigo. La periodaĵo senmaskigis la bulgaran burgaron kaj ties rilaton al la proceso. Per korespondantoj de hispanaj, svedaj, francaj, danaj kaj alaj kunlaborantoj „Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“ informis siajn legantojn pri la protestoj en la koncernaj landoj defende al Dimitrov kaj liaj kamaradoj Tanev, Popov kaj Torgler. Tiamaniere la gazeto elstaris kiel arda heroldo de la objektiva vero kaj pasia defendanto de la juĝotaj kontraŭfaŝistoj.

Aparte menciinda estas la vasta solidareco de la sovetaj homoj kun la batalo de Dimitrov kontraŭ la faŝistaj akuzantoj. En sia defenda parolado li multfoje kaj arde defendis Sovetunion kaj la landajn sekciojn de la Komunista Internacio. Jam historiaj estas la vortoj de Dimitrov, ke Sovetunio, okupanta „sesonon de la terglobo“ estas „la plej granda kaj justa lando en la mondo“. Antaŭ la faŝista tribunalo li atakis ne nur la germanajn, sed ankaŭ la ĉiulandajn faŝistojn; defendis la nacian prestiĝon de la laborama bulgara popolo kaj la partion de la bulgaraj komunistoj.

Kaj Dimitrov venkis!

Venkis la progresema kaj pacama homaro. La historio tion pruvis.

Partoprenantoj en la migranta seminario por studado de la vivo de Georgi Dimitrov, organizita de esperantistoj-turistoj el Bankja, vizitis survoje vilaĝon Kovačevci. Ili vizitis la historian muzeon kaj la nun konstruatan monumenton de Georgi Dimitrov en la minista urbo Pernik kaj la Dimitrov-muzeon en Sofio.

La esperantistoj el Bankja preparas ekskurson al Dimitrovgrad. Poste ili organizos marŝon laŭ la vojo de Dimitrov kaj Kolarov de

Petrohan ĝis la landlimo, partoprenos ekskursojn al Lejpcigo kaj Zuriko.

Somere 100 esperantistoj el Bankja organizos marŝon de sia urbo al Kovačevci. Ili dediĉos 100 horojn da libervola laboro por bonkonstruado kaj plibeligo de Kovačevci kaj donacos al la renovigita naskiĝloko de Dimitrov cent el la cent mil rozoj, florantaj en Bankja.

BORIS ATANASOV

DUA ELDONO DE VERKOJ DE DIMITROV

Aperis unua volumo de la dua eldono de Verkoj de Georgi Dimitrov. Ĝi enhavas verkojn kaj dokumentojn de la unua jardeko de la XX jarcento (julio 1902 — junio 1909). La en ĝi traktataj problemoj koncernas antaŭ ĉio la karakteron, la celojn kaj la taskojn de la profesiaj organizaĵoj de la bulgara proletaro, ĝiajn klasbatalojn kaj la kontraŭlaboristan esencon de la sindikata reformismo en ĉiuj ĝiaj variaĵoj kaj formoj. Krome la publikigitaj verkoj malkovras la proceson de politika elkresko de Georgi Dimitrov kiel proleta revoluciulo.

En la recenzata volumo troviĝas lokoj ankaŭ vico da verkoj de Georgi Dimitrov, en kiuj li prilumas iujn problemojn de la internacia laborista unueco, la internacian laboristan solidarecon dum grandaj klasbataloj kiel en la tiama bulgara socio, tiel ankaŭ en aliaj landoj de Eŭropo.

La unua volumo de la verkoj de Georgi Dimitrov estas riĉa fonto pri la historio de la klasaj bataloj de la revolucia laborista movado en Bulgario dum la unua jardeko de la XX jc.

La eŭropa proletaro defende al Dimitrov



NOVA LIBRO PRI GEORGI DIMITROV

En la hungaraj librovendejoj aperis la libro de Milen Semkov „Moabit-8085“, kiu prezentas momentojn el la majesta duelo de Georgi Dimitrov kun la faŝismo en la tagoj de la Lejpciga Proceso. La libro estas kolektiva eldono de la eldonejoj „Condolap“ kaj „Koschut“.

En redakcia noto al la libro oni substrekas la heroecon de la fama aganto de la internacia laborista kaj komunista movado, kiu, defendante sin mem antaŭ la imperia juĝantaro, senmaskigis la faŝistajn krimulojn.

◀ Sovetaj laboruloj entuziasme bonvenigas la liberigitan heroon de Lejpcigo.



NOVAĴOJ EL KUBRAT

En la komenco de 1982 en la nordorienta bulgara urbo Kubrat sub la aŭspicio de la Urba Konsilantaro por Kulturo kaj de la Sindikata Kulturdomo okazis la tradicia 8-a Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE). Ĝi estis dediĉita al la 25-jara datreveno de E-societo „Progreso“ en Kubrat (fondita en 1956 de Petar Kolev kaj d-ro Ivan Kirčev), al la 1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato kaj al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov.

Post raporto pri la 25-jara agado de la esperantistoj el Kubrat salutparolojn faris reprezentantoj de la distriktoj Ruse, Sumen, Razgrad k. a., Ivan Ivanov — prezidanto de la Urba Konsilantaro por Kulturo, Kovács Sándor el Várpalota, Zombori Orsolya el Debrecen, Ljubica Kozakova — reprezentantino de E-klubo Košice, Jozef Sliacky el Zvolen, Lenka Neubelerovala el Poprad kaj Veronika Lachová el urbo Kežmarok.

Surprizo de la belarta programo estis la filmo pri Kubrat. La ĉarmajn kantojn en tiu ĉi filmo plenumas nia samurbanino — la fama bulgara kantistino Lili Ivanova.

La intereso de la partoprenantoj en „VARE — 82“ altiris la bildarta ekspozicio de Metodi Pančev el Sofio kaj filatela ekspozicio titolita „Paĝoj el unu heroo vivo“, kiu sur 60 albumfolioj, per poŝtmarkoj kaj kovertoj, prezentas la vivon de Georgi Dimitrov. Dum unu semajno multaj civitanoj kaj gelnantoj el la urbo kaj el najbaraj loglokoj vizitis kaj guis ilin.

La partoprenantoj en „VARE — 82“ vizitis la aŭtentikan muzeon pri la etnia grupo „kapanci“ en vilaĝo Topčii, kies direktoro Gane Jordanov en bona Esperanto donis klarigojn al la gastoj.

Post la fermo de la arango por la alilandaj gastoj estis organizita vizito al urbo Sumen, alloga per siaj monumentoj kaj muzeoj. Por niaj hungaraj gastoj certe precipe interesa estis la vizito en la muzeo de Lajoš Košut.

Okazis kortuŝa renkontiĝo de la alilandaj gastoj kun la esperantistoj el Sumen.

La grupo de medicinistoj el Debrecen kun gvidantino Zombori Orsolya vizitis la hospitalon en Kubrat — la rezulto de tiu ĉi renkontiĝo de medicinistoj estis praktika pruvo pri la taŭgeco de Esperanto en la medicina fako.

ANTON ANTONOV

MEMORLIBRO DE LA AMIKECO

La „Ora Libro“ de E-societo „Vekiĝo“ en Sumen ekzistas jam 18 jarojn. Dum tiu periodo en ĝi estas registritaj dekoj da amikaj impresoj kaj bondeziroj de bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj, gastoj de la societo. Estas konservitaj valoraj leteroj, ricevitaĵoj de fremdaj landoj, bondeziroj okaze de la 75-jara jubileo de „Vekiĝo“ kaj ties distingigo per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado.

La memorlibro komenciĝas per mesaĝo de la eminenta bulgara ĵurnalisto, sociaganto kaj honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev. Sur la paĝoj de la „Ora Libro“ oni kun intereso legas liniojn kaj nomojn de elstaraj personecoj. Menciindaj estas: soveta lingvisto prof. Evgenij Bokarjov, famaj E-poetinoj Hilda Dresen kaj Ljudmila Jevsejeva, vjetnama poeto-heroo Nguen Haj Trung, vicprezidanto de UEA Baldur Ragnarsson, bulgara E-verkistino Rajna Konstantinova, naskita en Sumen.

Tamen plej karaj kaj emociplenaj estas la linioj skribitaj omaĝe al la glora 1300-jara jubileo de Bulgario. La mondfama angla poetino kaj verkistino Marjorie Boulton arde bondeziras: „Al la multsuferta bulgara popolo, nun feliĉe vivanta, mi deziras pluan progreson kaj pacon.“ E-grupo el la ĝemela urbo Debrecen (Hungario) ankaŭ esprimas sian admiron kaj dankemon. Specialan versaĵon al siaj ŝumenaj geamikoj dediĉas la esperantisto el alia ĝemela urbo — Usti nad Labem (Ĉeĥoslovakio).

La „Ora Libro“ de la ŝumena E-societo „Vekiĝo“ entenas sincerajn impresojn kaj amikajn bondezirojn, saturitajn de amo kaj estimo al la bulgara popolo, al nia kara patrolando.

CVJATKO TODOROV

HONORE AL JUBILEULO



La 25-an de januaro okazis solena vespero en E-societo „G. Dimitrov“ en urbo Dimitrovgrad. Oni celebris la 60-jaran E-agadon de la veterano Vlado Valčev.

La jubileulo estas unua instruanto de Esperanto en Dimitrovgrad kaj unua prezidanto de la antaŭa loka E-societo „Internacia Amikeco“. Li aktive kontribuis por la starigo de monumento al d-ro L. L. Zamenhof.

Pro senlaca poresperanta agado kaj meritoj por disvastigo de Esperanto la CE de BEA distingis Vlado Valčev per la titolo „Honora Membro de BEA“.

MINKA KAZAKOVA

FRUKTODONA RENKONTIĜO

La 15-an de februaro en la klubejo de E-societo „Nova Vojo“ en Pernik okazis renkontiĝo de la E-aktivuloj prof. Vasil Cočov, Belka Beleva kaj Maria Angelova kun lernejoj el la fakultativaj kursoj de Esperanto en iuj lernejoj de Pernik-distrikto. Ĉeestis ankaŭ Maria Todorova, distrikta korespondanto de j. „Rabotniĉesko Delo“, kaj reprezentanto de fako „Kulturo“ de la Distrikta Popola Konsilantaro en Pernik.

En amika konversacio kun la ĉeestantoj la gastoj el Sofio rakontis pri sia konatiĝo kun Esperanto, pri la senco kaj celoj de la E-movado. Sekvis artaj plenumoj de la gastoj. La aktorino Belka Beleva recitis E-poemon, kaj la opera kantistino Maria Angelova kantis fragmentojn el operoj.

La prezidanto de la loka E-societo Pera Ivanova varme dankis al la gastoj pro la vizito kaj esprimis deziron pri pli oftaj renkontiĝoj.

N. MITEV

AMIKECO INTER BLINDAJ ESPERANTISTOJ

La 40-an Jubilean Kongreson de BEA en 1980 en Plovdiv ĉeestis du blindaj sovetaj geesperantistoj el urbo Kislovodsk — la instruistoj Anastasija Jukova kaj Vladimir Radĉenko. Ili ligis amikajn kontaktojn kun turistoj el la produktad-entrepreno „Uspeh“ (Sukceso) ĉe Asocio de la Blinduloj en Bulgario.

En 1981 plovdiva E-grupo el 9 bulgaraj turistoj, inter kiuj 5 blinduloj, vizitis Kislovodsk kaj surgrimpis montesupron Elbrus en Kaŭkazo. En la muzeo de Elbrus estis lasita memorplato kun surskribo „1300 jarojn Bulgario“. La vizito koincidis kun tradicia tendaro de sovetaj blindaj esperantistoj. Iun vesperon la grupo gastis ĉe ili.

Sekvis vizito al Bulgario de kislovodska grupo, gvidata de Radĉenko — 10 personoj, 8 el kiuj blinduloj. La sovetaj turistoj marŝis laŭ la kresto de Balkan-montaro, ekkonis iujn turistajn kaj historiajn lokojn en Rodopi-montaro kaj Plovdiv.

Ekzistas reciproka deziro, ke la amikaj rilatoj daŭru kaj evoluu en la estonto.

VLADIMIR JELEV

EKSPozICIO PRI GEORGI DIMITROV

En majo ni planas organizi ekspozicion dediĉitan al la 100-jariĝo de la eminenta filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov.

Bonvenaj estas ĉiuspecaj materialoj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj pri la vivo, revolucia agado kaj sociopolitika aktivado de Georgi Dimitrov. Ĉiu kontribuanto ricevos memordonaceton.

Nia adreso: Junulara E-grupo „G. Dimitrov“, Teknikum po tjuĵuneva teknologija, BG-4550 PESTERA, Bulgario.

NOVA E-SOCIETO

En la malnova urbo Elena, situanta en la sino de la Balkanmontaro, ankaŭ ekbilis la Verda stelo — dank' al la klopodoj de la fervora esperantisto Sava Stanev antaŭ nelonge estis fondita E-societo „Verda Balkano“. En la salono de Urba Komitato de la Patrolando Fronto kolektiĝis instruistoj, kuracistoj, teknikistoj — homoj diversaj kaj diversprofesiaj, por aŭskulti prelegon pri la internacia Lingvo Esperanto, pri ĝia disvastigo en la mondo kaj pri ĝia aplikado en ĉiuj sferoj de la vivo. La prelegon faris Ĥristo Dolĉinkov — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en urbo Veliko Tirnovo.

Post klarigo de la Statuto de BEA fare de Nikola Najdenov, sekretario de DE de BEA, la ĉeestantoj unuanime elektis kiel prezidanton de la nova E-societo Sava Stanev kaj kiel ĝia sekretario — Rozka Gvozdeeva.

N. N.

NOVAJ E-KURSOJ

Preslav. Ĉiujare la E-societo en la urbo organizas E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj.

En du lernejoj de Preslav Esperanton lernas entute 40 ĝelernantoj. Ĉi-jare en la urbo funkcias ankaŭ kurso por E-instruistoj.

BORIS STOJANOV

Ŝumen. 34 ĝelernantoj de Ekonomia Mezlernejo „V. Piskova“ lernas fakultative la Internacian Lingvon sub la sperta gvidado de ing. Stefan Georgiev. Plej diligentaj estas Ĥristina Stanĉeva, Rosica Varbanova, Rajna Ivanova, Maria Pavlova, Krestinka Jonkova.

V. DRAGOSTINOVA



Foto: K. OGNJANOV

AMIKA EKSURSO

En februaro grupo da ĝekursanoj de Dimitar Denĉev el Sofio okazigis amikan ekskurson kun geesperantistoj el Botevgrad. Oni vizitis la belan ripozlokon Stubelja kaj montodomon „Rodinata“ (la Patrolando), situantan sur la montokresto de Balkan-montaro.

Okazis agrabla interparolado kaj ligitis novaj individuaj kontaktoj.

Printempe botevgradanoj gastos al siaj sofiaj ĝeamikoj kaj kune ekskursos en Vitoŝa-monto.

La kuna iniciato montris, ke similaj turismaj kontaktoj inter esperantistoj el diversaj lokoj estas utilaj kaj necesaj por fortikiĝo de niaj E-vicoj kaj por konatiĝo kun la belaj de nia ĉarma lando.

DUTAGA E-RENKONTIĜO EN DRESDEN

Je la 18—19-a de septembro 1982 okazos E-renkontiĝo en urbo Dresden (GDR). Partoprenkotizo: 30 markoj (sen tranoktado). Unu tranokto kostos 12.50 markoj. La interesigantoj petu aligilon kaj detalan informon de: Kulturbund der DDR,

Kreisverband Esperanto,
8016 DRESDEN, PF 44, GDR.

RUSLINGVA NOVELO PRI ESPERANTO

Antaŭ nelonge en la ruslingva gazeto „Ural“ aperis novelo „La klubo „Espero“ de la juna sovetista verkisto Leonid Juzefoviĉ.

La ĉefroluloj estas du maljunaj esperantistoj, kiuj post multaj jaroj renkontiĝas denove en la urbo de ilia juneco. Ili rememoras pri eventoj, kiuj okazis en 1920 en gubernia urbeto. Oni konatiĝas kun la komplika, maltrankvila situacio tiutempe en la lando. La aŭtoro prezentas la agadon de unu el la multaj E-kluboj, aperintaj post la Oktobra Revolucio en Sovetunio. Inter ties membroj elstaras de unu flanko — la maljuna esperantisto, doktoro Sikorskij, kiu altiris multajn homojn al la ideo de Esperanto, sed poste li mem elrevigis pri la lingvo, kaj de alia flanko — la gejunuloj, veraj soldatoj de la revolucio, kiuj konsideris Esperanton reala kaj grava rimedo por unuigo de la proletaro el la tuta mondo.

La novelo „La klubo „Espero“ estas verkita klare kaj bonstile. Oni legas ĝin facile kaj kun intereso.

IRINA SALIMZJANOVA
(Taŝkent, Sovetunio)

ESPERANTISTAJ KONKURSOJ EN ESTONIO

Estona Filio de ASE kaj Tartua E-klubo aranĝis la 10-an kaj 11-an de aprilo konkursojn por amatora arto kaj olimpikojn pri kono de Esperanto por gelnantoj. La partoprenintoj en la konkurso pri amatora arto „Kannel'82“ sin prezentis per kantoj, teatraĵoj, deklamado, spritaĵoj, originalaj kaj tradukitaj poezio kaj prozo. Partoprenis la horo de estona akademia teatro „Vanemuine“ kaj aliaj konataj artkolektivoj.

La gelnantajn olimpikojn partoprenis gelnantoj de 5-a ĝis 11-a klasoj. La olimpikoj pasis tre interese kaj montris la nivelon de Esperanto-lernado en 26 estonaj lernejoj. La konkursa tasko estis legado de teksto el la lernolibro de Johannes Palu, uzata en ĉiuj estonaj lernejoj, kaj formado de kvar demandoj lige kun la legita teksto plus demandoj de la jurio. La Olimpikoj instigis la lernantojn al pli fundamenta posedo de la Internacia Lingvo. Al la gajnintoj estis disdonitaj premioj kaj diplomoj.

JOHANNES PALU

PORPACA EKSPOZICIO

Novgoroda E-klubo „Stelo de l'Espero“ intencas aranĝi ekspozicion je temo „Esperanto helpe al la tutmonda paco“. Konekse kun tio la estraro de la klubo alvokas la esperantistojn el ĉiuj landoj alsendi malnovajn ĵurnalojn kaj revuojn, afiŝojn, bildkartojn kaj leterojn.

Nia adreso: E-klubo „Stelo de l'Espero“.

DK n. de Vasiljev, str. Gercen,
SU — 173000 NOVGOROD, USSR

LA LEGANTOJ PRI REVUO „BULGARINO“

Jam dum pluraj jaroj revuo „Bulgarino“, jara eldono de la Komitato de Bulgaraj Virinoj, aperas en kvar naciaj lingvoj kaj en Esperanto. En la Komitato de Bulgaraj Virinoj kaj en Bulgara Esperantista Asocio venis dekoj da leteroj el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Francio, GDR, Hispanio, Hungario, Nederlando, Svedio kaj USSR, en kiuj oni esprimas tre favorajn kaj flatajn opiniojn pri la revuo. Ĉi-sube ni donas lokon al unu el tiuj ĉi leteroj:

Antaŭ ol estimi alilandan nacion, oni devas ekkoni ĝin. Mi neniam estis en Bulgario, sed mi aŭdis entuziasmodon pri rakontojn pri la beleco de Bulgario, pri la afableco de ĝia popolo. En la sovetista gazeto kaj en „Bulgara Esperantisto“ mi legis pri la 1300-jaraĵo de la bulgara ŝtato. Tamen pli detale ekkoni vian landon kaj popolon helpis al mi revuo „Bulgarino“, kiun antaŭ nelonge mi ricevis.

La jara eldono por 1981 ravis min per sia ekstera ukse bela aspekto. Kun grandega intereso, atente mi tralegis ĉiun linion, rigardis ĉiun ilustraĵon, admiris la klaran lingvon kaj seneraran presadon. Nun, finstudinte „Bulgarinon“ 1981, mi volas diri, ke ĝi estas inda kontribuo al la 1300-jara jubileo de via ŝtato. La historio kaj nuntempo de via lando estas prezentitaj sur 36 paĝoj laŭ emociplena maniero. Precipe plaĉis al mi, ke la revuo rakontas pri la rolo de la bulgara virino en la vivo de la popolo dum 13 jarcentoj.

Post la legado de la revuo oni sentas kontentecon, profundan ĝojon, ke ekzistas en Eŭropo Bulgario kaj ĝia laborema, nobla, pacama popolo — konstruanto de la socialisma socio.

Dankego al la aŭtoroj, tradukintoj kaj eldonintoj!

ARTURS KUBULNIEKS,
Latvio, USSR

PEDAGOGIA E-RENKONTIĜO

Inter la 10-a kaj 24-a de julio 1982 la Kooperativa Instituto por Moderna Lernejo (ICEM) organizas E-renkontigon pri Freinet-pedagogio apud Budapeŝto, Hungario. Korespondadreso:

Por la socialismaj landoj:

S-ino Gabriella Osz, Hengermalom u. 47, H-111 BUDAPEST, Hungario.

Por la kapitalismaj landoj:

S-ro Henri Menard, 1, rue de la Galissonniere, F-44330 LE PALLET, Francio.

ENKETO PRI GEORGI DIMITROV

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov ni intencas organizi internacian enketon je temo „Kion vi scias, rememoras kaj opinias pri la internacia agado de Georgi Dimitrov?“ kaj ekspozicion el alilandaj materialoj (periodaĵoj, informoj pri kunvenoj pri Dimitrov, afiŝoj k. a.)

Nia adreso: E-societo „Ĥristo Kozlev“, PK 61,

BG-5180 POLSKI TRAMBES, Bulgario

TEJO EN TUTEŬROPA FORUMO

TEJO estas unu el la malmultaj tuteŭropaj organizaĵoj. Ĝi havas landajn sekciojn en Orienta kaj Okcidenta Eŭropo. Tio ja estas raraĵo, ĉar nur malmultaj internaciaj junularaj organizaĵoj (ekz. Internacia Studenta Movado por Kontribuo al UN) povas fieri pri samnivela agado en tuta Eŭropo.

Tiu ĉi speciala trajto de TEJO estas unu el la kialoj por aktiva partopreno en la Kadro de Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro. La antaŭ nelonge fondita „Kadro“ celas antaŭenigi la junularan kunlaboradon inter Oriento kaj Okcidento, alportante praktikajn rezultojn al la partoprenantaj organizaĵoj.

Inter la 30-a de novembro kaj la 3-a de decembro 1981 okazis en Berno (Svislando) la dua konsultigo de la Kadro. Je la nomo de TEJO partoprenis Elisabeth Schwarzer kaj Martin Haase (FRG).

Oni planis la agadon de la Kadro dum 1982. Estis decidite, ke la membroj-organizaĵoj laŭinterese kunlaboru en laborgrupoj: „paco kaj malmarmado“, „medio kaj medio-protektado“, „junulara turismo“, „fina doku-

mento de Helsinki pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo“, „Nova Internacia Ekonomia Ordo (NIEO)“, „UN-sistemo kaj Internacia Jaro de la Junularo (1985)“.

Dum la pasinta jaro TEJO estis membro de la laborgrupoj pri medioprotektado kaj NIEO kaj sendis reprezentanton ankaŭ al la „agadtago por malmarmado“. En Berno ni plu kunlaboris al la menciitaj laborgrupoj kaj farigis membroj de la laborgrupoj pri junulara turismo kaj pri la UN-sistemo kaj Internacia Jaro de la Junularo. La konsultigo aprobis rezolucion al la registaroj, subskribintaj la finan dokumenton de Helsinki, por ke ili komencu malmarmadon kaj plu atentu la laboron de la tuteŭropa junularo en la Kadro.

La Kadro de Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro permesas al ni, sen altrudi politikajn konceptojn, ne nur vidigi la funkciojn kaj la utilecon de Esperanto, sed ankaŭ aktive kontribui al paco kaj komprenemo en la mondo, disigita en ideologiajn kaj armeajn blokojn.

MARTIN HAASE (FRG)

LA NOVA ESTRARO DE TEJO

Pro manko de kvoromo de la komitat-kunsidoj en la pasintjara 37-a Kongreso de TEJO en Oaxtepek (Meksikio) la protokolo

de la Komitato estis ratifita per poŝta voĉdono. Tiel validiĝis la estraraj elektoj. Ĝis 1983 TEJO havos la jenan estraron:

Prezidanto, estrarano pri varbado kaj landa agado en Koreo kaj Japanio:

AMRI WANDEL (ISRAELO)

Ĝenerala sekretario:

CSABA LENDVAY (HUNGARIO)

Estrarano pri kongresoj:

YVES BELLEFEUILLE (KANADO)

Estrarano pri landa agado:

THOMAS BORMANN (FRG)

Estrarano pri financoj, eldonadoj kaj servoj:

IAN JACKSON (BRITIO)

Estrarano pri edukado de gvidantoj:

MICHAEL LENNARTZ (GDR)

Estrarano pri scienca kaj faka agado:

ANDRAS LUKACS (HUNGARIO)

Estrarano pri Komisiono pri Eksteraj Rilatoj:

IAN TARRANT (BRITIO)

STUDENTA E-KURSO EN VARNA

En sia numero de la 21-a de januaro j.k. j. „Narodno Delo“ — Varna publikigis noton de la studento Petar Mateev sub titolo „Kurso de Esperanto“.

Li sciigas, ke en la Supera Medicina Instituto (VMI) estas intereso pri Esperanto kaj multaj studentoj deziras lerni ĝin. La studento proponas, ke oni organizu E-kurson en la Instituto.

En postnoto la redakcio sciigas, ke ĝi konatigis la rektorejon de VMI—Varna kun la propono de P.

Mateev kaj ricevis jenan respondon:

„Ni opinias, ke la propono estas ĝustatempa kaj konvena. . . Komence de la dua semestro de la kurranta studjaro oni eklernos Esperanton en la fakultato pri sociaj profesioj.“

Do, la Internacia Lingvo ankaŭ estas instruata en la Supera Medicina Instituto en Varna. Laŭ informo de docento Georgi Dimov ni ekscias, ke li akceptis gvidi la E-kurson en la Instituto.

KIEL NI ALTIGU LA NIVELON DE NIA LINGVOSCIO?

MARJORIE BOULTON



Marjorie Boulton

Ni unue demandu al ni mem, kial ni altigu la nivelon de nia lingvoscio? Ĉar la precizaj procedoj dependas parte de niaj motivoj.

Ni konas tiujn, kies sinteno estas proksimume tia:

„Kial mi lacu min kaj perdimia tempo por altigi la nivelon de mia scio pri Esperanto? Mi ne deziras iĝi Akademiano. Mi korespondencas kun multaj plumamikoj kaj ni interŝanĝas poŝtmarkojn. Mi enĝojas la societalan vivon de nia loka grupon en mian urbon. Mi estas tuta kontenta kaj mi havas pli gravaj aferoj al kiujn decidi mian tempon.“

Ili parolas ne Esperanton, sed la rivalan internacian lingvon, Esperanton. Nu, ĉiuj devas en la vivo iom elekti; aliaj aferoj ja postulas nian atenton kaj tempon. Se ni deziras, ke Esperanto estu kiel eble plej utila al la tuta homaro, estas verŝajne preferinde, ke iu uzas ĝin utile, kvankam ne tre bone, ol ke ĝi restu neuzita. Ni estu iom toleremaj; tamen, estas tre bedaŭrinde, resti fuŝesperantisto, se niaj cirkonstancoj kaj talentoj permesas al ni progresi. Kaj kiom ajn da indulgemo ni montru al aliaj, ni memoru, rilate

al ni mem, ke multaj homoj mirinde venkas tre malfacilajn cirkonstancojn, ĉar ili sincere volas venki; kaj ke talentoj kreskas, eĉ surprize, se ni kultivas ilin. Fuŝesperantisto ne nur malmulte servas Esperanton, kaj foje eĉ malservas ĝin, sed tute ne ricevas de ĝi la profitojn kaj plezurojn, kiujn li povus ricevi.

Mi mencias unue kelkajn pli nalppli universalajn motivojn por plibonigi nian lingvoscion.

Unue, la celo de Esperanto estas pli bona komunikado. Kvankam elementa scio ebligas ian minimuman komunikadon, ju pli bone ni scipovas nian lingvon, des pli bone ni povas komuniki kun aliaj.

Ni eble kredus, ke du diversnaciaj komencantoj povas ĝui kontentigan korespondadon aŭ konversacion sur malalta nivelo kaj ke, se ili faras kelkajn erarojn, ne gravas. Sed erarantoj el du nacioj ne faras la samajn erarojn! Kaj ne scias, kiajn erarojn la nacia lingvo de la alia instigis.

Angla komencanto volas menciigi buŝon, ne rigardas sian vortaron, sed pro la influo de la angla vorto toad skribas todon. Sed eble tio kaŭzos, ke hispano kredas, ke la edzino de la anglo trovis en la ĝardeno tuton (hispano) — sed tutan kion? Franco, ke ŝi trovis domacon (fr. taudis); kaj germano eble kondolencos, ĉar ŝi trovis la morton (der Tod)! Kaj ni povas imagi la konfuzon, se estas hispano, kiu volas skribi ion pri bufo, kaj en Esperanto uzas la hispanan vorton sapo!

Sur pli alta nivelo ni povas erari, se ni pensas pri la signifo de iom internacia radiko en la propra lingvo, kaj uzas bonan esperantan rilatan radikon, sed kun la senco-nuanco ne de Esperanto, sed de nia propra lingvo. Ni povas, ekzemple, misuzi akto, aktuala, dezerto, aŭ deserto, eventuala, glaso, merkato, observi, pipo, popo, slipo, strikta. Ni memoru ĉiam, ke korespondanto povas serĉi vorton en vortaro, sed ne povas mense retraduki nian Esperanton en nian nacian lingvon, por kompreni, kion ni intencis skribi. Do, grava motivo estas, ke ni komprenu unu la alian plene.

Alia motivo estas, ke ni ne tedu aliajn! Ĉiu el ni iam estis komencanto, kaj ofte estas devo de sperta esperantisto montri paciencon kaj indulgemon, kiam komencanto fuŝas, balbutas, hezitas.

Nu, mi penas al komencanto esti afabla kaj kuraĝiga; sed kiam mi post kvin jaroj ren-

kontas la saman komencanton, aŭ devas deĉifri ankoraŭ fuŝajn leterojn, mi emas protesti: „Ĉiu devas iam komenci, sed neniu rajtas ĝismorte komenci!“ Kaj tro da „eternaj komencantoj“ tre malaltigas la nivelon de kulturo kaj aktivoj en ia grupo — aŭ internacia kongreso.

Se ni serioze ŝatas Esperanton, ni havu etan sloganon:

„Ne estu nur samideanoj, estu samlingvanoj!“

Pli egoisme: ju pli bone ni scipovas la lingvon, des pli bone povas utiligi ĝin — por vojaĝi, skribi al fak-delegitoj pri niaj fakaj aferoj, ĉeesti kongresojn, legi internaciajn librojn, viziti, memfide akcepti vizitantojn, servi nian ŝatokupon aŭ kolekton, k.t.p.

Ni ankaŭ savas nin de misjuĝoj kaj eĉ malĝentilajoj. Mi memoras germanon, kiu diris al mi: „Vian Esperanton estas ne guta, mi ne kompreni vian anglujan dialekto.“ Japana komencantino iam riproĉis Julion Baghy: „Estas telule malfacile komplezi vi, ĉa' vi palolas kun telule folta hungala akcento!“ Sperta esperantisto komprenas, ke preskaŭ ĉiuj el ni havas etajn naciajn trajtojn en la elparolo, sed facile aŭdas ĉiujn, ne nur samlandanojn, kies akcento estas tiu, kiun li kutimas aŭdi! Nescianto ofte akuzas francon pri „francismo“, hungaron pri „hungarismo“, kiam la frazo estas tute internacia, aŭ parolas pri „neologismo“, kiam iu uzas eĉ zamenhofajn vortojn, kiujn ne konas.

Ni ellernu, ankaŭ por ke ni ne malpropagandu. Mi plurfoje renkontis homojn, kiujn tielnomitaj esperantistoj forpelis de Esperanto. Antaŭ multaj jaroj, mi mem naŭzigis kaj preskaŭ forlasis Esperanton pro fuŝado kaj krokodilado en nacia kongreso. La plej promesplena esperantistino, kiun mi iam ajn instruis, tuj forlasis Esperanton post vizito al loka grupo de nekompetentuloj.

Neniu faros brilan laboron sur ĉiu kampo, sed eble iu havas ian apartan ambicion.

Tiu, kiu deziras instrui Esperanton el aliaj, nepre laboradu por konstante plialtigi la nivelon de sia scio. Malbonaj instruistoj ofte mallogas lernantojn. Instruisto devas vere bone scipovi la lingvon. Eble alia deziras igi impona oratoro, kiel Leo Belmont, Privat, Lapenna, Auld, Tonkin. Alia volas traduki ian majstroverkon el la nacia lingvo. Estas tre facile traduki ion en Esperanto nebone; sed bona traduko ne estas lerneja tasko, kaj postulas bonan scion.

Kiel ajn aktoro kapablas montri emociojn kaj vere eniri fremdan personecon, li ne utilas, se oni ne aŭdas la vortojn; li stumblas meze de frazoj, ellasis akuzativojn kaj fuŝas la lingvan parton de sia tasko.

Esperanto estas bonega lingvo por la poezio. Sed neniu kredis, ke poeto nur rapide skribas kelkajn sent-esprimojn kaj tajpas ilin en mallongaj linioj. Eĉ por fari etajn ŝercajn ri-

maĵojn bone, ni bezonas edukitan lingvosenton, kaj memdisciplinon. Iam la fama pentristo, Joshua Reynolds, faris belan pentraĵon tiel rapide, ke aliaj miris. „Kiom da tempo vi bezonis, por pentri tion?“ iu demandis. „Tridek jarojn!“ li diris, kaj tiel estas kun ĉiu arto. Simile, se vi deziras verki romanon, novelon, eseon, ion ajn, vi devos plene lerni la metion.

Eble vi deziras diskonatigi ion inter esperantistoj; se jes, memoru, ke malbona lingvaĵo tre eble malpropagandos vian aferon, sugestante, ke la ismano ne estas tre inteligenta.

Eble vi deziras servi la Movadon kiel organizanto. Se jes, vi bezonas multajn talentojn kaj virtutojn ne lingvajn. Sed organizanto, kiu ne povas klarigi ion pri Esperanto al ĵurnalisto, prezenti preleganton, danki preleginton, instrukcii pri arango, skribi protokolon, prezidi kunsidon, verki raporton, bonvenigi eksterlandanon, ne estus tre utila.

Ni turnu nin al kelkaj praktikaj preskriboj. Unue, jen kelkaj rimedoj por tiuj, kiuj havas specialajn celojn. Se vi deziras instrui, nepre poluru vian scion pri nia gramatiko kaj lingvaj kutimoj, ĝis ĝi brilas. Estas vera misfaro instrui erarojn! Se eble, ĉeestu ian kurson pri la Cseh-metodo; ĝi ne estas la sola bona metodo, sed donas valoregajn ideojn pri instruaj metodoj. Studu diversajn lernolibrojn; ekzistas bonegaj, banalaj, eĉ malbonaj. Se vi instruos en lernejo, kiel eble plej larĝe studu porinfanajn librojn; kaj ĉiuokaze, iĝu kompetenta por konsili pri legmaterialo. Du aparte utilaj libroj estas „Esperanto kaj lernejo“ (1959) kaj „Metodiko de la Esperanto-instruado“ (1970).

Tiu, kiu deziras igi oratoro, nepre legu kaj relegu almenaŭ la praktikan parton de Retoriko de Ivo Lapenna. Studu elstare bonajn paroladojn, ekzemple tiujn (presitajn) de Zamenhof, Lapenna kaj multajn presitajn en la gazetoj. Estas valore, analizi tiajn paroladojn.

Sed oni ne iĝas oratoro nur per legado; necesas plibonigi sian elparoladon kaj ĝenerale ekzerci sin. Diskoj kaj sonbendoj helpas nin. Kaj parolu! Unue al vi mem en aparta ĉambro, poste al loka grupeto. . . oni ne naĝas ekster la akvo.

Tiu, kiu deziras traduki, nepre serioze pripensu la tradukan arton, ĉar multaj, kiuj tradukis, ne havis sufiĉe severajn kriteriojn. Bona traduko trovas la plej proksimajn ekvivalentojn por redoni la formon de la verko, la precizan enhavon, laŭeble la detalajn nuancojn (ekz. ne ruĝa se devus esti skarлата), la stilon, kaj ian specialan ornamadon, ekzemple ian vortludon. Tradukemulo penu pligrandigi sian vortostokon kaj pli bone kompreni nuancojn. Alia tre utila ekzerco estas, preni vere rekomendindan tradukon, ekz. de Za-

menhof, Kaloscay, Auld, Rosseti, Bernard, kaj detale kompari ĝin kun la originalo.

Por la aktoro ekzistas multaj konsiloj, kiuj estas sufiĉe universalaj; kaj rigardi bonan aktoradon en iu ajn lingvo estas instrua. Sed specialaj lerniloj por tiu, kiu volas aktori en Esperanto estas diskoj, sonbendoj kaj prezentadoj en Esperanto.

Al tiu, kiu volas fariĝi poeto, mi konsilus legi multajn bonajn poemojn; studu ekzemple la „*Esperantan Antologion*“. Ankaŭ nepre legu, relegu kaj uzu la konsultlibron „*Parnasa Gvidlibro*“ — ĝi helpas, eĉ por verki nur etajn amuzajn poemojn. Por fariĝi verkisto de iu ajn speco, legu jam rekonitajn bonajn verkojn en via fako. Ne imitu — valora verkisto parolas ne per buŝo de alia; sed lernu kriteriojn kaj studu esprim-rimedojn. Tre

gravas por ĉiu verkisto la vortostoko kaj la gramatiko. Kaj tiu, kiu volas verki, prelegi aŭ diskuti pri iu faka temo, akiru la vortaron de tiu fako.

Organizanto nepre speciale studu la historion de la Movado kaj la Jarlibron de UEA; kaj aparte al organizanto mi rekomendas libron, rekomendindan al ĉiu esperantisto: „*Esperantisto en Perspektivo*“. Bona organizanto konsciencie atentus ĉiutagajn detalojn; sed li aŭ ŝi komprenu pri grandskalaj rilatoj, kaj pri la mirakloj de kontaktoj kaj kunlaboradoj, kiujn Esperanto jam nun ebligas.

Sekvas kelkaj ĝeneralaj konsiloj, validaj por ĉiuj.


(Sekvas en n-ro 5/1982)

MAŬZOLEO DE RAKOVSKI

En la renesanca urbo Kotel estas konstruita maŭzoleo de la eminenta bulgara renesanculo kaj revoluciulo Georgi Rakovski. Grupo da specialistoj el la Instituto pri Morfologio ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj fronte de la doktoro de Medicinaj Sciencoj Jordan Jordanov preparis la ostrestaĵojn de Rakovski por ilia eksponado. Ili estis metitaj en hermetike fermitan urnon kaj poste en la ŝtonan sarkofagon de la maŭzoleo.

Socialisma Bulgario konstruis al la titano de la bulgara renesanco templon en la centro de lia naskiĝurbo por konservi dum miljaroj la majestecon de liaj spirito kaj agado. Simbolo de granda patriotismo, li edukos la generaciojn en spirito de fideleco kaj sinoferemo al la Patrujo.

La maŭzoleo estis solene inaŭgurita honore al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato.



KONCIZE

● **ŜUMEN.** Jam kelkajn monatojn la esperantistoj el la urbo kunvenas en nova klubejo sur strato „Al. Konstantinov“ en kvartalo „Enju Markovski“.

Gratulojn kaj bondezirojn por la vigla E-ĝado!

● **DRJANOVO.** „Defendu la pacon kaj vivu!“ — sub tiu alvoko la esperantistoj el la urbo kolektis 5411 subskribojn. Ili estos senditaj al la Dua speciala sesio de UN pri malfarmado.

NI KONDOLENCAS

La 22-an de decembro 1981 en Plovdiv forpasis **IVAN SAVOV**, kontraŭfaŝisma batalanto kaj E-aktivulo.

Li naskiĝis en 1904 en Kukuŝ, Makedonio.

Post la Balkana Milito lia malriĉa familio transloĝiĝis unue en Sofion, kaj poste en Plovdiv. Ivan Savov laboris en tabakfabriko kaj aktive partoprenis en strikoj.

En 1920 li fariĝas membro de la Bulgara Komunista Partio; komencas lerni Esperanton. Pro partopreno en la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923 Savov estas arestita. Li estas unu el la organizantoj de Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA), kunlaboras al gazeto „Rabselkor“ (Laborista-Kamparana Korespondanto) kaj al „Sennaciulo“, organo de SAT.

Post la 9-a de Septembro 1944 Ivan Savov aktive partoprenas en la socialisma konstruado. Dum kelkaj jaroj li estas prezidanto de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv.

Niajn sincerajn kondolencojn al lia familio!

Niajn vicojn forlasis la multjaraj esperantistoj

Ĥristo Cankov el Veliko Tirnovo, 76-jara,
Ivan Markov el Polski Trambes,
Nenĉo Stefanov el Jambol, 49-jara,
Pavel Ĥarlov el Trjavna, 69-jara.

Ili sindone kontribuis al la popularigo de la Internacia Lingvo en nia lando. Al la funebraĵaj familiaĵoj ni esprimas niajn elkorajn kondolencojn.



La premio por paco kaj kunlaborado „Ora Merkuro“ estas fondita en 1960 en Italio kiel nacia premio, kiun oni ĉiujare prijuĝas al firmoj, organizaĵoj, al amaskomunikiloj kaj al apartaj personoj, kiuj grave kontribuis por evoluo de la ekonomio kaj la internacia ekonomia kaj kultura kunlaborado.

De 1968 la premio estigis eŭropa kaj de 1975 — internacia. De 1970 oni prijuĝas ĝin al ŝtatestroj kaj al gvidantoj de registaroj.

La premioj de la „Ora Merkuro“ estas: emblemo de la internacia organizaĵo el pura oro, per kiu oni distingas ŝtatestrojn kaj gvidantojn de registaroj, dek premioj „Ad personam“ kaj dek premioj „Ad honorem“ por personoj, organizaĵoj kaj firmoj, internacia premio „Ora Merkuro“ por informa agado, internacia premio „Ora Merkuro“ por evoluo de la produktado kaj la ekonomia kunlaborado, per kiu oni distingas organizaĵojn, firmojn kaj apartajn personojn.

En oktobro 1980 en Moskvo, je la XX-a konferenco de la premio por paco kaj kunlaborado „Ora Merkuro“ per tiu ĉi premio estis distingita la ĝenerala sekretario de CK de KPSU kaj prezidanto de la Supera Soveto de USSR Leonid Breĵnev, kaj je la XXI-a konferenco, kiu okazis en Sofio, en septembro ĉi-jare, per la sama premio estis distingita la unua partia kaj ŝtata gvidanto

de PR Bulgario Todor Jivkov pro lia kontribuo por la stabiligo de la paco kaj la kunlaborado inter la ŝtatoj kaj la popoloj en la mondo. Per la sama premio estis distingitaj ankaŭ ĉirkaŭ 50 bulgaraj entreprenoj, eksterkomercaj organizaĵoj, institutoj kaj amaskomunikiloj, ĉirkaŭ 50 entreprenoj el la socialismaj landoj kaj pli ol 100 firmoj, institutoj kaj apartaj personoj el 30 kapitalistaj landoj.

La premio „Ora Merkuro“ estas alta rekono de la sukcesoj kaj la aŭtoritato de Bulgario sur la kampo de la internacia ekonomia kaj kultura kunlaborado, de ĝia reala kontribuo al la batalo de la popoloj por paco kaj amikeco.

ORIGINALA E-VERKARO

LA KORO DE POETO

Ĉu vi scias kio estas la koro de poeto?
Ĝi estas kiel perla mitulo. La suferoj, kluj
eniras
ĝin, estas la sableroj, kluj transformiĝas en
perlojn.
Kaj ju pli grandaj la suferoj estas, des pli
bonaj estos
la perloj — kantoj, fabeloj, rakontoj.
La homoj, kluj ornamas sin per perloj de
mituloj, ne scias
iliajn suferojn, dum ili transformas la
sableron en perlon.,
Same kiel oni ne scias la doloron kaj tur-
mentojn de poeto.
klu transformas siajn suferojn en gojon por
la aliaj

NEVENA NEDELČEVA

PRINTEMPO

La Noktoj
Malvarmaj, mallumaj ja estas malbelaj.
Ho, estas tiel diversaj la noktoj:
Koŝmaraj, senfinaj, senlumaj, senstelaj!
Matenas...
Varmiĝas per suna elspiro la tero,
Ekkantas sonore kaj gaje la birdoj,
Vekiĝas naturo, odoras aero.
Printempas...
Kaj nun malfermiĝas fenestroj sen retoj:
Rapidas, rapidas kaj jen kolektiĝas
Kaj blankaj, kaj flavaj, kaj nigraj manetoj!
Amikoj!
Printempo ĉi tiu nun estas tre klara
Kaj ĉiu malfermu fenestrojn rapige,
Fenestrojn de l'paco, de l'amo homara!
La noktoj...
Kaj varmaj, kaj lumaj ja estas tre belaj!
Ho, estas tiel diversaj la noktoj:
Sennubaj, senfrostaj, stelplenaj kaj helaj!

MARIN BACEV

distroj

LA KVALITOJ DE LA VINO

Kiam oni plantis la unuan vitbranĉon, oni surverŝis ĝin per sango de pavo. Post kiam ĝi foliigis, oni surverŝis ĝin per sango de simio. Kiam la vinbergrapoloj elkreskis, ĝi estis surverŝita per sango de leono. Kaj kiam la vinberoj plenplene maturiĝis, oni surverŝis la viton per sango de porko.

Tial post la unua glaso da vino oni fariĝas ĝaja, promenadas kiel pavo. Se oni drinkas plue, oni saltadas, petoladas kiel simio. Se oni daŭrigas la drinkadon, oni estiĝas furioza kiel leono, mugas, rompas, pecetigas, insultas. Kaj se poste oni ankoraŭ drinkas, kuŝiĝas en la koton kiel porko.

El hungara: ASEN JOSIFOV

ANEKDOTOJ

ĈAPELO

En Londono ĉapelisto metis ĉapelon en sia montrofenestro per la sekanta reklamtabulo:

„Niaj propre fabrikataj ĉapeloj estas la plej bonaj en la mondo. Nian ĉapelon portas ankaŭ Charlie Chaplin, la nekronita reĝo de la filmo!“

Nokte, la najbara ĉapelisto, gluis grandan, larĝan paperrubandon sur la montrofenestron per tekstokompletigo:

„... Kaj per tiu ĉapelo li ridigas la tutan mondon!“

NUR MUSTARDON

Gabrovano aĉetis kolbason. La vendisto pakis ĝin kaj aldonis tubeton da mustardo.

— Sed mi ne petis mustardon! — kontestis la gabrovano.

— Ĝi estas senpaga aldonado al la kolbaso.

— En tia okazo, donu nur la mustardon...

MARK TWAIN REDAKTORO

La usona verkisto Mark Twain, estante redaktoro de ĵurnalo, ricevis per la poŝto tre maldecajn versaĵojn, titolitajn: „Kial mi vivas?“

Resendante la manuskripton, Twain respondis al la aŭtoro:

„Vi vivas, ĉar vi sendis viajn versaĵojn per la poŝto kaj ne prezentis vin persone en la redakcio...“

MALLONGIGO DE TEATRAJO

La mondkonata irlanda verkisto Bernard Shaw neniam permesis al la reĝisoroj mallongigi la tekstojn de liaj teatraĵoj. La direktoro de londona teatro, enscenigante komedion, verkitan de Shaw, post la ĝenerala provludo sendis al li jenan telegramon: „Permesu al ni mallongigi vian teatraĵon, ĉar la gastantaj spektantoj malfruigos kaj ne sukcesos preni la lastan trajnon.“

Shaw respondis: „Mallongigon mi ne permesas, do ŝanĝu la horaron de la trajnoj.“

NENIO NOVA SUB LA SUNO!



SUPO EL LITEROJ

Tiu ĉi kvadrato, plena de literoj, enhavas ses nomojn de mebloj.

Serĉu ili!:

Por la celo vi povas legi horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale — en ambaŭ direktoj, sed ne transsaltu literojn.

A	B	O	M	E	N	I	A
T	O	F	O	S	I	O	K
E	P	U	F	O	D	N	E
B	A	N	K	O	Ĉ	E	S
A	N	I	M	T	U	G	A
L	A	O	L	I	L	U	L
D	K	A	I	L	E	N	O
O	S	T	R	A	V	O	S



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Inĝ. Dimitar Vasilev, str. „Latinka“, bl. 73 A, 1113 Sofio — pri konstruado de raket-, ŝip- kaj aviadilmodeloj kun CSSR, GDR, Pollando, Francio, FRG, Hispanio kaj Svislando.

Stefan Georgiev (47-jara), bul. „Lenin“, bl. 45, vñ. A, ap. 15, Dimitrograd — kun, samaĝuloj el ĉi, interŝ. bildkartojn.

Valentin Stojanov (24-jara), str. „Dvorjanov“ 36, 4300 Karlovo — pri turismo, beletrio, kino, muziko, angla kaj pola lingvoj.

Inĝ. Vanjuša Totev, bul. „Stefan Karaĝa“ 5, 5306 Gabrovo — interŝ. insignojn kaj flagojn de futbalkluboj el ĉi.

Ivanka Koleva (61-jara), bul. „G. Dimitrov“ 93/42, et. 8, 9000 Varna — pri ĉi.

Angelo Ĉirpanski (13-jara), str. „Sini vrh“ 55, 4230 Asenovgrad — kun ĉi.

Diana Kasapeteva (15-jara), str. „Kapitan Rajčo“ 28, 4230 Asenovgrad — kun samaĝuloj el ĉi pri ĉi.

Gelernantov (15-16-jara) — 9-a E-klaso, Gimnazio „Lenin“, 4230 Asenovgrad — kun ĉi pri ĉi.

Aleksandar Kanev, str. „Kr. Partacev“ 8, 4579 Bracigovo — pri ĉi kun ĝejunuloj, precipe el Greklando, CSSR, Japanio, Ĉinio, Sovetunio kaj Jugoslavio.

Cvetka Ivanova (18-jara), str. „Rakovski“ 16, 8200 Pomorie — pri sporto kaj muziko, en Esperanto, rusa, franca kaj greka lingvoj.

Jordanka Marinova (25-jara), v. Aleksandrovo, Loveŝko — kun ĉi pri ĉi.

Galina Atanasova (18-jara fraŭlino), „Zavodski blok“ 23, Loveŝko — kun ĉi pri ĉi.

Eli Angelova (15-jara), str. „Panaret“ 7, 4230 Asenovgrad — kun samaĝuloj el ĉi pri ĉi.

POLLANDO

Stanisław Pawełczyk (31-jara instruisto), 06-230 Różan, ul. Kościuszki 28 — pri problemoj de instruado, agrokultura tekniko kaj sporto, dez. interŝ. esperantistojn kaj bildkartojn kun bulgaroj.

Krystyna Groszek (26-jara studentino), 60-625 Poznań, ul. Wojska Polskiego 79 — kun bulgaraj ĝejunuloj pri vojaĝoj, opero, balet — en Esperanto, rusa kaj pola lingvoj.

Tadeusz Smykalski, str. Słowackiego 9 m 125, PL-42-200 Częstochowa — kun ĉi pri priskriba geometrio, arkitekturo, matematiko, medicino, drogherboj, fotografio, kuirarto, joko k. a.

Johano Marzyjanek (23-jara), str. Sienkiewicz 11/1, 37-700 Przemyśl — kun ĉi pri ĉi.

Kazimierz Dąbrowski (23-jara), ul. Koreńska 1/226, PL-52-121 Wrocław — kun ĉi pri literaturo, fremdaj lingvoj kaj turismo.

Aldona Kulinska (19-jara), Debina, 62-425 Witkowo, woj. Konin — pri muziko, literaturo, poezio, sporto kaj politiko kun bulgaroj.

Eugeniusz Górny (28-jara fraŭlo, tornisto) — pri sporto, dez. interŝ. bildkartojn kun bulgaroj.

Bożena Swierczyńska (21-jara), str. 1-go Maja 90/5, 26-110, Skarżysko Kamienna — pri sporto, turismo, kino, teatro, literaturo; dez. interŝ. bildkartojn kun floroj.

Katerina Górna (15-jara lernantino), Dobrzyniewo, PL 89311, Falmierowo — kun samaĝuloj pri plibonigo de la lingvokonoj, pri muziko.

Roman Majewski (19-jara lernanto en teknikumo), Zewomin, 97-315 Tuszyn — kun bulgaroj pri geografio, sporto, vojaĝo kaj literaturo.

Czesław Pietysiak (31-jara), interŝ. bildkartojn, poŝtmarkojn, librojn, turismajn prospektojn kun bulgaroj.

Inĝ. Waldemar Sado (53-jara), Batorego 37-19, 00-612, Warszawa — pri historio, filatelo, turismo.

SOVETUNIO

Vija Pommere (30-jara apotekistino), SU-229240 Ergli, str. Lenina 25, Latvio — interŝ. insignojn, poŝtmarkojn kaj bildkartojn kun ĉi, precipe kun samideanoj el socialismaj landoj.

Olle Ninaste, Hele Kylvja kaj Aire Metsoja (16-jaraj lernantinoj), Komuna adreso: SU-202615, Estonio, Värskä — pri ĉi, interŝ. bildkartojn kun ĉi.

Kirdan Leonido (25-jara) — SU-703039, Samarkand-39, Sami Baeva, 44 — kun bulgaroj pri muziko, modo, fotografio.

Esperantistoj el Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco, SU — 703000 Samarkando, Glavpočtam, abon. jaŝeik 76, Uzbekistano — kun ĉi pri ĉi.

Grigaitė Jolanta (17-jara) — 235030 Kedainiai, Vilainiai-53, Litovio — kun ĉi, interŝ. bildkartojn.

Igorj Grigorjev (15-jara lernanto), 454084, Celjabin-84, pr. Pobedi, d. 166-g, kv. 125 — interŝ. poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

Irina Sedova (16-jara), Leningrad 194021, pr. M. Torea 13-4 — kun ĉi pri ĉi.

Anastasija Romanovska (24-jara) kaj Sandra Tanzone (23-jara), Latvio, 228600 Valmiera, Sporta-5 — kun ĉi pri ĉi.

Sur la unua kovrilpaĝo:

Fragmento de la monumento „Aprila Ribelo 1876“ en Panagjuriŝte.

GRAVA SCIIGO


POR DONI EBLECON AL ĈIUJ, KIUJ ANKORAŬ NE SUKCESIS ABONI LA ASOCIAN ORGANON «BULGARA ESPERANTISTO», LA REDAKCIO PLILONGIGIS LA LIMTEMPON POR ABONADO ĜIS LA FINO DE JUNIO 1982.

LA ABONKOTIZOJ ESTAS LA SAMAJ: POR BULGARIO — 2,90 LEVOJ, POR LA SOCIALISMAJ LANDOJ — 5,40 LEVOJ AŬ EGALVALORO EN NACIA VALUTO, KAJ POR LA CETERAJ LANDOJ — 5,90 LEVOJ AŬ EGALVALORO EN NACIA VALUTO.

NE FORGESU ABONI LA REVUON ANKAŬ POR VIAJ ALILANDAJ AMIKOJ!

LA ABONKOTIZOJN SENDU AL LA ADMINISTRACIO DE «BULGARA ESPERANTISTO» — BUL. HRISTO BOTEV 97, BG-1303 SOFIO, BULGARIO.

UNIKA MARŝADO



Georgi Sergiev

La 3-an de marto 1981 de la antikva bulgara ĉefurbo Pliska la majstro de la sporto Georgi Sergiev komencis sian unikan marŝadon. Dum 365 tagoj t. e. dum unu kalendara jaro, sen ripoztago, li decidis pasi 12 220 km tra 188 urboj, 144 vilaĝoj kaj 26 turistaj montodomoj, sekante la limojn de ĉiuj distriktoj en Bulgario. En septembro 1981 li pasis laŭ la plej longa turisma vojo en Bulgario: de Petrohan ĝis kabo Emine laŭ la kresto de Balkan-montaro.

Ĝis nun ni ne havas informojn pri simila marŝado alilande.

Reprezentanto de la redakcio interparolis kun Georgi Sergiev kaj starigis al li kelkajn demandojn:

— Bonvolu prezenti vin!

— Mi estas naskita en Razgrad kaj estas 62-jara pensiulo, ĝis antaŭnelonge mi laboris en la Bulgara Olimpika Komitato. De 1968 ĝis nun mi faris 20 memstarajn marŝojn. En 1975, dum 96-hora tagnokta senĉesa marŝado mi trairis la distancon Sofio — Burgas (tra Plovdiv), entute 424 km — ĝis nun ne superita monda rekordo.

— Kia estas la celo de via lasta manifestajo?

— Tiun ĉi marŝadon mi dediĉas al la 1300-jariĝo de nia ŝtato. Sur mia vojo mi pasis tra multaj urboj kaj vilaĝoj, mi vidis multajn monumentojn, malnovajn fontojn kaj pontojn, kiujn mi fotis. Entute mi uzis 214 fotofilmojn. Mi faris notojn pri ĉio vidita. Mi intencas prepari albumon kaj transdoni ĝin al la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto. Kaj mia granda celo estis travagi la Patrujon kaj ekkoni ĝin kiel neniu alia.

— Kia estis via nutraĵo, via manĝmaniero dum via vojaĝo?

— Mi povas diri — ordinara. Alkoholaĵojn mi ne uzis. Kafon kaj „koka kola“ mi permesis al mi nur ĝistagmeze. Mi faris eksperimenton — survoje al Smoljan du tagojn mi manĝis nenion, mi trinkis nur akvon. Mi volis kontroli la rezervojn de mia organismo. Mi eltenis. Mi zorgis dormi almenaŭ ok horojn en la diurno. Mia tuta ekipaĵo estas bulgara.

— Viaj planoj?

— Mi ne bezonas ripozon. Mi soifas renkonti miajn kamaradojn kaj amikojn. Mi klopodos verki du librojn. La unua — „Rakontas la turisto“ — pri ĉio vidita kaj travivita, kaj la dua — „Aboco de la piedirado“. Mi intencas entrepreni novajn vojaĝojn enlande kaj eksterlande.

ĤRISTO GEORGIEV — merita majstro de la sporto, ĉefredaktoro de la bulgara revuo „Turisto“

Redakta komitato

Dento **ĤITROV** (ĉefredaktoro), Marin **BACEV**, Vasil **BOROVANSKI**, prof. Vasil **ĈOĈOV**, Dimitar **ĤAĤIEV**, Krastju **KARUCIN**, Ĥaim **LEVI** (vicĉefredaktoro), Flori **NIKOLOV**, Lidia **RAEVA**.

Administrantino: Kalinka **VASILEVA**

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordono „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

tel. 31-00-29